**La babiladaj rondoj** okazas vendrede je la 19a horo. La gastiganto mem preparas simplan manĝaĵon (**ĉef**manĝon kaj deserton). La invititoj alportas **nur** trinkaĵojn kaj aperitivaĵojn. Okaze de kunveno ĉe Espace Dickens, la gastiganto preparas terpomojn kaj deserton. La gastoj alportas fromaĝojn, trinkaĵojn kaj aperitivaĵojn. La salono estas pagata el la kaso.

Ambaŭgrupa babilada rondo : vendrede la 18-an de majo ĉe Knud kaj Marie-Antoinette Sunier en Montreux.
Vendrede la 8-an de junio ĉe Espace Dickens organizota de Francisko.

## "Okcidenta grupo":

**Ve, la 6-an de julio**
ĉe François Randin
ch. de Vallombreuse 14, Lausanne
076 411 14 55

Aliĝu ĉe:
http://doodle.com/8dk45bkb8brdf2nd

## "Orienta grupo":

**Ve, la 1-an de junio**
ĉe Clea Robin
ch. du Culat 20, Vouvry
024 481 33 06 / 079 330 04 03

Aliĝu ĉe:
http://doodle.com/poll/rwvef6hykb5dqds6

**La Magia Lando:** Di, la 26-an de aŭgusto, ekde la 11-a, LES organizos piknikon en la kabaneto de Sauvabelin, route de la clochatte 2. Tie ni filmos la lastajn scenojn de nia filmo. Aliĝu al **francisko@eo-l.ch** por ricevi detalojn.


## Laŭzana Esperanto – Societo

ĉe F. Randin – ch. de Vallombreuse 14 * CH – 1004 LAUSANNE
+41 21 647 29 28 * sekretario@eo-l.ch
https://www.facebook.com/esperantolausanne
Poŝtĉekkonto – CCP 10-26785-8
Prez.: David Buhlmann * 021 624 36 38 – Vicprez.: Charlotte Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: François Randin * 076 411 14 55 –Kasisto : Françoise Pétermann * 079 517 44 43
Redaktoro de la informilo : Knud Sunier * 021 961 38 56


# Laŭzana Esperanto-Societo

# Informilo

junio 2018 – n° 06

Kunsidoj normale okazas ĉiumonate
ĉe Espace Dickens, rue Dickens 6, Lausanne

En junio "ĝin" anstataŭos la

## Jara ekskurso en Morges

**kiu okazos sabate, la 23-an de junio 2018**



Pagu ĝis la 30-a de majo
al CCP 10-26785-8 de LES.
**Via pago validas kiel aliĝo.**

***Dimanĉe la 26-an de aŭgusto ekde la 11-a*:**
*Pikniko en la kabaneto de Sauvabelin*



Lunde, la 3-an de septembro
> Decidota

Lunde, la 1-an de oktobro
> Decidota



Lunde, la 5-an de novembro
> Decidota




Neniam mortos la mondo pro manko da mirindaĵoj, sed nur pro manko de miro.

*G.K. Chesterton*

## Legendo pri la vinberoj

Dio Bakĥo, ankoraŭ infano, vojaĝis al Nakso, unu el la Cikladaj insuloj. Ĉar la vojo estis longa, li, laca, sidiĝis sur ŝtono por ripozi. Ĵetinte rigardon al la tero, la juna dio vidis herbon elirantan el ĝi kaj li trovis ĝin tiel bela, ke li pensis tuj ĝin kunporti. Sed ĉar la suno estis tre varma, li timis, ke la planto sekiĝos antaŭ lia alveno : kaj pro tio li enmetis ĝin en osteton de birdo.
En la mano de la dio la tigo kreskis tiel rapide, ke ĝi baldaŭ preterpasis la oston malsupre. Tiam Bakĥo, vidante tere oston de leono, pli grandan ol tiu de birdo, enmetis en ĝin la planton kaj la unuan osteton.
Sed, ĉiam kreskante, la tigo baldaŭ preterpasis ankaŭ la leonoston. Tiam Bakĥo, trovinte oston de azeno eĉ pli grandan ol tiu de la leono, enmetis en ĝin la kreskaĵon kun la du aliaj ostoj.
Tiel li alvenis al Nakso. Sed kiam li volis meti la arbeton en la teron, la radikoj tiel forte alligiĝis al la tri ostoj, ke li devis planti kune la tuton.
La arbeto kreskis rapide: kun granda ĝojo de la dio, ĝi portis mirindajn berarojn. Bakĥo premis la berojn kaj faris el ili la unuan vinon, kiun li donis al la homoj por trinki.
Sed tiam mirindaĵo okazis. Kiam la homoj komencas trinki, ili ekkantas kiel birdoj. Kiam ili trinkas plue, ili fariĝas fortaj kiel leonoj. Sed se ili ankoraŭ plue trinkas, ilia menso malklariĝas, iliaj kapoj malleviĝas; unuvorte ili fariĝas similaj al azenoj.



Elio Migliorini
Esperanta Legolibro
Itala Instituto de Esperanto 1985

## La Magia Lando

La filmado bone komenciĝis. Nia reĝisoro–kameraisto kondukas brile la grupon de aktoroj. Ni jam ĝojas vidi aŭtune tiun kreaĵon. Dankon al ĉiuj pro la helpo kaj la partopreno.

## Bildrakonteto

Kiu pensas esti petola, trovas iun pli petolan ol si mem :

